

LA VERDA LUPEO



Informilo de ELF/AREK

Decembro 2018

(50a jaro)

N-ro 179

Esperanto Ligo Filatelista / Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Redakcio: Rudolf Burmeister Max-Müller-Str. 86 DE 09123 CHEMNITZ

世界にひとつが
うれしいね。
写真付きのマイ切手

● 切手と写真部分を郵便物に貼って、ご利用いただけます。
● 写真部分だけでは、切手としてご利用いただけません。
● 郵便料金納付のために写真付き切手をご利用の場合、写真部分に消印がかかることがあります。

2003, Marto, la unua japana E-pm (s-ano Tuĵi)

Anton Kronshage, (1929-2018)

En la aĝo de 89 jaroj, post longa malsano, mortis Anton Kronshage la 14an de julio 2018 hejme en sia loĝloko Schwelm.

Ĝis unu jaro antaŭ sia morto li preskaŭ ĉiutage vizitis lokajn Esperanto-renkontiĝojn, inter alie en Wuppertal, Dortmund kaj Düsseldorf.

Pri Esperanto li interesiĝis jam tre frue en juna aĝo kaj li vizitis Esperanto-kurson, kiam li havis 27 jarojn. Li partoprenis kongresojn kaj volonte gastigis Esperanto-amikojn.

Li estis dumviva membro de la Germana Esperanto-Asocio kaj de la Universala Esperanto-Asocio. Ekde 1988 li estis membro de ELF/AREK. Je multaj okazoj li varbis por Esperanto, inter alie per malgrandaj ekspozicioj, ekzemple en vitrinoj de publikaj institucioj: distrikta administrejo, ŝparkaso, biblioteko kaj lernejo. Apud la informoj li montris esperantajn poŝtmarkojn, stampojn kaj monerojn kaj ekspoziciis internacian korespondadon.

Kune kun sia Esperanto-amiko Heinz Schindler li iniciatis, ke en Schwelm du stratoj estis nomitaj "Zamenhofweg" kaj "Esperantoweg".

Andreas Kronshage (la filo)

Ni sincere kondolencas al la familio Kronshage

Elda Doerfler /Rudolf Burmeister

514 aliĝintoj festis en la iama japania ĉefurbo NARA la duan Komunan Esperanto-Kongreson de Koreio kaj Japanio. Estis la 105a japania kaj la 50a koreia Esperanto-kongreso, 12-14 Oktobro 2018. Temo de la kongreso estis

Diverseco kaj Komuneco de Kulturoj.

En la reto troveblas multaj ligoj pri tiu kongreso, elstara la ret-adreso por la Kongresa Libro.

En ĉiuj tri tagoj funkciis poŝtejo en la kongresejo.

Memore al la kongreso aperis:

- Kongresa koverto
- Kongresa poŝtkarto
- Kongresa poŝtstampo
- 4 kongresaj poŝtmarkoj



A	B
C	D

A = 82 enoj, kadro: 38x38

B = 82 enoj, sen kadro

C = 82 enoj, kadro: 30x43

D = 62 enoj, kadro: 30x30

Teksto en la korea, japana kaj Esperanto:

La 2-a KOMUNA
ESPERANTO-KONGRESO
Japanio kaj Koreio
12-14 oktobro 2018
NARA

Bildo: verda stelo, floroj kaj
ruĝa kapo de cervo

La markoj estis haveblaj en
folioj kun 10 kaj 20 pecoj
laŭ informo en la kongresa libro.



La kongresa poŝtstampo

Uzita 12 - 14 Oktobro 2018
en la kongresa poŝtejo

Diametro: 32 mm, ruĝa

Teksto:

*La 2-a Komuna Esperanto-
Kongreso de Japanio kaj Koreio
2018 NARA*

Bildo:

E-stelo kaj 2 cervoj

La 57a japana E-stampo

Pli ol 1200 Sika-Nara-cervoj vivas en la iama imperiestra urbo Nara, ĉefe en la urba parko. Ili ĝuas absolutan protektadon kaj estas la turisma pinto. La vizitantoj nutras ilin per rizokuketoj, vendataj en multaj budoj.





Kongresa poŝtkarto kun 62ena pm



Kongresa koverto kun 62- kaj 82ena pm-oj

Al niaj fidelaj veteranoj Haruja Maekaŭa kaj Suzuoki Ziro koran dankon!



La poŝta stampo, uzita
18.08.2018

Plurtagaj seminarioj, gvidataj de kompetentaj spertuloj, estas la karakterizaj programeroj de la italaj kongresoj.


La kongresa temo de la 85a itala E-kongreso:

**“SAN MARINO KAJ ESPERANTO:
MALGRANDAJ KOMUNUMOJ
KAJ GRANDAJ VALOROJ**

estis pritraktata en seminario, en prelegoj, diskutoj.

Okazis diversnivela lingvokurso kaj prezentado de novaj eldonaĵoj aĉeteblaj ĉe la libro-servo. Krome okazis: Koncertoj, filmoj, teatraĵoj.

Kaj por la nedormemuloj ankaŭ la jam tradicia nokta programo, malfermita al ĉiuaĝaj junuloj.



Elf-Arek en la Lisbona UK kaj en la Movada Foiro

Nia prezidantino Elda Doerfler raportis:

... Elstara la kunveno de Elf-Arek (malmodeste dirite, tre malmodeste): ĝi estis vizitita de ĉirkaŭ trideko da personoj, al kiuj mi - kune kun la numismato Albert Boon - prezentis ambaŭajn asociojn. Mi pritraktis la historion de Elf-Arek, tian kia ĝi aperas en la pm-katalogo, sed aldonante multajn bildojn. Poste mi montris ankoraŭ alian bildaron kun titolo:

Vojaĝo en la tempo per poŝtkartoj kaj glumarkoj.

Nur du personoj eliris dum mia prezentado, do tio laŭ mi signifas ke ĉiuj havis sufiĉan intereson.

Dum la movada foiro - pro mia altrudiĝo - iuj pagis ne ankoraŭ pagitajn membrokotizojn, akiris kelkajn esperantaĵojn....

En la Movada Foiro Lille nia prezidantino kun Albert Boon






Japanio, 2018, printita de BELTONO,

Folieto (15x10 cm) kun 8 glumarkoj (33x33 mm), memgluaj, nedentumitaj, 3 el ili nedatumitaj, 5 glm datumitaj porokazaj:

- 2-a KOMUNA ESPERANTO-KONGRESO, 2018 en Nara,
 - A) sur flava fono, B) sur blanka fono
- La 65a Kongreso de Esperantistoj en Kansajo, 2018 en Suita (2 samaj)
- 103a UNIVERSALA KONGRESO, 2018 en Lisbono



Japanio, 2005, printita de BELTONO

La 92a Japania Esperanto--Kongreso Jokohamo, 2005.10. 21-23

Folieto (15x10 cm) kun 6 glumarkoj (40x40 mm) memgluaj, nedentumitaj, 3 en la supra vico sur verda fono, 3 en la suba vico sur flava fono.

1937: Jubilea ĉina glumarko: 50 jaroj Esperanto

Demandis Maurice Caron: "...Kiu konas tiun ĉi ĉinan glumarkon?..."
Al la demando reagis ĉina klubano GAO:

La kopio estas iom neklara, sekve ne komplete legebla.
La dentumita verda glumarko montras portreton de Zamenhof

Supre: MONDON AMANTA LINGVO *)
Maldekstre: NUN EN LA MONDO NI DEVAS UZI KOMUNAN LINGVON
Dekstre: BONVOLE LERNU ESPERANTON
Sube: Ne legebla pro surpriso

La surpriso: MEMORE AL LA 50A DATREVENO
DE LA NASKIĜO DE ESPERANTO

***) Tiel ni ĉinoj nomis Esperanton**

1927 aperis serio de 192 bildpoŝtkartoj kun nominalo de 50 heleroj, 4 el ili kun teksto en Esperanto, sekvis 1938 serio kun 80 bildpoŝtkartoj, inter ili ankaŭ 4 kun tekstoj en Esperanto, 50 heleroj.

1949 aperis serio kun 32 poŝtkartoj, 4 inter ili kun Esperanto-tekstoj.

Alpresita poŝtmarko (1,50 kronoj) montras prezidenton Klement Gottwald. 3 el la 4 kartoj posedas tekston en la ĉeĥa; la 4a karto tekston en la slovakia.



3.— Kčs

POŠTOVNÍ DOPISNICE

adresát _____

ulice _____

místo určení _____


2 pošta _____

Praha: Esperantské středisko v srdci Evropy
Esperantista centro en koro de Europo


150
ČESKOSLOVENSKO

Ĉeĥa teksto: Praha: Esperantské středisko v srdci Evropy
Esperantista centro en koro de Europo

2



**Ĉeĥa teksto: OSTRAVA Esperantská vysílačka v cehoslovenském uhelném kraji 5
Esperantista radiostacio en cehoslovaka regiono de karbo
(Karto kun preseraro "cehoslovaka" anst. "ĉeĥoslovaka")**



**Teksto en la slovaka: Turčiansky Sv. Martin
Sidlo slovenského esperantského ústavu
Sidejo de Slovaka Esperanto-Instituto**

8

3— K&S

POŠTOVNÍ DOPISNICE

adresač _____

ulice _____

místo
určení _____

pošta _____

Doksy: Letní kolej esperantská
Somera Esperanto-kolegio

24

150
ČESKOSLOVENSKO



Ĉeĥa teksto: Doksy: Letní kolej esperantská
Somera Esperanto-Kolegio

24



1931 Liechtenstein POŠTKARTO 20 rappoj
VALO DE VALŬNA EN SOMERO



1931 Liechtenstein POŠTKARTO 20 rappoj
VALO DE VALŬNA EN NEĜO

Ekzistas 39 diversaj poŝtkartoj: 28 je 20 rappoj kaj 11 je 10 rappoj.



1930, 7 kopekoj brikruga
 Franca, belorusa, Esperanto
BEST SAFETY MATCHES



1930, 7 kopekoj
 Franca, armena, Esperanto
RESINOTRUST
 (ankaŭ en franca, rusa, belorusa, ukraina,
 gruzia, azerbajĝana kaj Esperanto.)



1927 FERMITA LETERO 8 kopekoj
Surskriboj en rusa, azerbajĝana, Esperanto



1930 FERMITA LETERO 10 kop, oliva

Surskriboj en la rusa kaj esperanto
Koverta kun varbteksto: Kolektu la rubaĵojn de la kuirejo

**Konstantin Ciolkovskij, membro de SEU
de Antonio de Salvo en**

<http://www.bitoteko.it/esperanto-vivo/eo/2018/09/17/konstantin-ciolkovskij/>

La 17-a de septembro (la 5-a de septembro laŭ la julia kalendaro, tiam valida en Rusio) estas la datreveno de la naskiĝo (en 1857) de la rusa sciencisto laŭ pola deveno (lia patro estis sendita al Siberio de la cara Registaro) Konstantin Eduardoviĉ Ciolkovskij (1857-1935), konata en la pola kiel Konstanty Edward Ciołkowski, en la angla kiel Konstantin Eduardovich Tsiolkovsky, en la franca kiel Constantin Édouardovitch Tsiolkovski, pioniro de aëronaŭtiko kaj astronautiko: ŝuldiĝas al li interalie, la unua fludinamika tunelo (1897), la projektado de dirigeblaj aerbalonoj kun metala ujo kaj de metalaj aviadiloj, la pioniraj studoj pri misiloj kun raketa pelado kaj de plurŝtupaj misiloj, la ideo de artefaritaj satelitoj kiel enorbitaj deirbazoj por esplorado de la kosmo.

Liaj intuicioj kaj kalkuloj estis fundamentaj por la evoluo de la soveta kosma programo en la dua duono de la pasinta jarcento.

Genia memlerninto (li ne povis havi regulan kleriĝon, ĉar li fariĝis surda en knaba aĝo) kaj strangulo (li estis longe taksata pli-malpli frenezulo, dum li estis nur homo provizita per malfermita menso, tamen kun granda fruo kompare kun sia tempo), Ciolkovskij agadis en la plej malsamaj kampoj, evoluigante propran filozofion, bazitan sur la kreo de novaj kondiĉoj por la homa vivo kaj sur la ekzisto de inteligenta vivo ekster la Tero: li okupiĝis pri astronomio, astrofiziko, astrobiologio, matematiko, geokemio, teknologio, genetika inĝenierado, sed ankaŭ pri sciencfikcio, filozofio kaj lingvistiko.

Li proponis komunan alfabeton por ĉiuj lingvoj, kiun li nomis “OA”; sed li estis skeptika pri la eblecoj de sukceso de artefarita lingvo kiel komuna lingvo, ĉar li opiniis, ke la internacia lingvo ellaboriĝos spontane, aŭ estos elektita inter la plej evoluintaj naciaj lingvoj. Koncerne Esperanton en si mem, en letero de 1934 al M. I. Popov, Ciolkovskij skribis, en rusa lingvo:

“Certe, Esperanto estas la plej bona el ĉiuj artefaritaj lingvoj. Senduba simpleco de la alfabeto, mirinda facileco de la gramatiko, konateco de la vortaro – faras ĝian inventinton senmorta”.

La p. 279-280 de la libro de M. Arlazorov “Ciolkovskij”, Molodaja gvardija, Mosca 1962 (citita en artikolo de V. Kulikov en “Esperanto de UEA” 1963-4, p. 66-67) raportas pri la interesoj de Ciolkovskij rilate internacian lingvon; aparte, je p. 225 estas reproduktita la membrokarto liverita al Ciolkovskij, la 4-an de novembro 1934, kiel membro de la

Sovetrespublikara Esperantista Unio

Tutunia Asocio de Amikoj de la Internacia Lingvo.

Estas rimarkindaj la respondoj, skribitaj de Ciolkovskij en rusa lingvo, al la demandoj de la karto:

- – *socia stato: pensiulo*
- – *kleriĝo: speciale instruita*
- – *partieco: senpartia*
- – *laboro: konstruanto de aeraj balonoj*
- – *kono de Esperanto: maljuna por lerni*

Konklude:

- – Ciolkovskij ne parolis Esperanton, kvankam aliloke li skribis, ke junaĝe li interesiĝis pri Esperanto, kaj eĉ ricevis leteron de D-ro Zamenhof;
- – li juĝis Esperanton “la plej bona el ĉiuj artefaritaj lingvoj”;
- – per si mem, tamen, tio ne egalas al petdeziro, ke ĝi estu adoptita kiel internacia lingvo;
- – do, malgraŭ lia pozitiva juĝo pri la kvalitoj de la lingvo, eble estas troige aserti, ke Ciolkovskij “estis esperantisto”.

Antonio de Salvo




Bulgario, 1962, 5 stotinkoj

Sovetunio, 1957, 40 kopekoj

Ciolkovskij-pm-oj aperis ankaŭ en Kubo, Gvineo kaj aliaj landoj.

650 jaroj Aŭstria Nacia Biblioteko Oficiala poŝtmarko, (eld. 6.5.2018)



La pm prezentas la barokan pompsalonegon en la Aŭstria Nacia Biblioteko kun ĝiaj 200.000 libroj el la jaroj 1501-1850 kaj kun la kolekto de Princo von Savoyen. Al la Nacia Biblioteko apartenas ankaŭ la Literatura Muzeo, Tergloba Muzeo, Papirusa Muzeo, la Esperanto-Muzeo kaj la Domo de Aŭstria Historio.

La festa malfermo de la Esperanto-Muzeo okazis 30. 07. 1929 en tiu ĉi pompsalonego en ĉeesto de 150 honorgastoj, inter ili la Federacia Prezidanto Wilhelm Miklas, ministroj, ambasadoroj kaj esperantistoj. Post la festparolado de Hugo Steiner, Prezidanto Miklos parolis en germana lingvo kaj finis per jena frazo en Esperanto:

"Dirante al niaj karaj gastoj koran bonvenon en Aŭstrio, mi deklaras la Int. E-Muzeon malfermita."



*Oficiala kongreskarto de la 28a UK
kun la Nova Imperiestra Kastelo
sendita 12. 8. 1936*



Prezidanto Miklas





ELF-AREK

Esperanto-Ligo Filatelista

Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Prezidantino:

S-ino Elda Doerfler

Via Ghirlandaio 18/1

IT-34138 TRIESTE

>testudo.ts@gmail.com<

Jen mia bankokonto:

IBAN IT35 R076 0102 2000 0001 7452 996 – Banco Posta

BIC: BPPIITRRXXX.

Por: Elda Doerfler

UEA-konto: ELF/AREK = Kodo: elfx/r

Jarkotizo: € 17.00 - Membroj en socialismaj kaj ekssocialismaj landoj: € 15.00

Se vi ne havas aliron al nia konto ĉe UEA, bonvolu kontakti nian prezidantinon.

Korekto de ĉinaj nomoj en LVL 178

En la artikolo pri lunkalendaro pluraj ĉinaj nomoj estas fuŝe skribitaj

(fare de mia skribmaŝino.) Bv. korekti al:

Zhou Zhiqi Sheng Shuchu Qin Kaiji Sheng Xiao

Benedicto Silva benedictosilva@yahoo.com

tre deziras korespondi kun esperantisto kolektanta GERMANAJN poŝtmarkojn.

Plie li ŝatus korespondi ankaŭ kun esperantistoj kiuj interesiĝas pri BRAZILAJ kaj/aŭ JAPANAJ filatelaĵoj!

En Esperantujo li estas konata kiel tradukisto de beletro kaj religiaj verkoj. En ĵurnaloj kaj revuoj aperis poeziaĵoj kaj rakontoj, originale verkita de li en Esperanto.

Krome li estas kolektanto de la infanlibro "PINOKJO" tradukita al aliaj lingvoj:

li posedas ĝin en 120 diversaj lingversioj.

Karaj Elf-Arek-anoj!

Baldaŭ for estos la 2018a jaro kaj komenciĝos nova etapo por ni ĉiuj.

Nia kara redaktoro Rudolf Burmeister streĉe kaj strebe laboradas por prezenti al Vi ĉiam pli interesan informilon: dankon al Li ankaŭ

vianome! Entute estis bona jaro por nia Ligo, kiun mi klopodis

disvastigi ne nur dum la UK-o sed ankaŭ dum aliaj E-kunvenoj kaj

miaurbe. Kiel jam estas mia jarfina kutimo, mi rekomendas al tiuj, kiuj

ankoraŭ ne estas pagintaj la kotizon por la jaro 2018, nuligi sian

ŝuldon: per tio vi kontribuos al pluvivado de Elf-Arek: dankon!

Deziras al vi Gaĵan Kristnaskfeston 2018 kaj bonan novan jaron 2019!

Elda Doerfler / Rudolf Burmeister